LVP

**PILO-PRESS**

Internacia

Informservo

Jarabono

30,-- DM

========

**Eldonanto/Herausgeber:**
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 43/76 - 2 nov 1976
Aperas ĉiusemajne

## Jerzy Grum en F R Germanio



Jerzy Grum

Nürnberg (pp) - Laŭ invito de Germana Esperanto-Asocio Jerzy Grum, la konata Esperanto-redaktoro de Pola Radio, faris kiel oficiala reprezentanto de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio prelegvojaĝon ĉe Esperantogrupoj en F R Germanio. Detalan raporton ni publikigos en la venonta numero de Pilo-Press. Sed jam hodiaŭ oni povas resume diri, ke la vojaĝo - malgraŭ la granda streĉo por la preleganto - estas plena sukceso.

Richard Reuchlin, Mannheim, konstatas, ke lia vizito estis sukcesa subteno de la laboro poresperanta en Mannheim kaj Ludwigshafen. Jerzy Grum prelegis en jenaj urboj: Hamburg, Bremen, Münster, Dortmund, Wuppertal, Düren, Frankfurt/M, Saarbrücken, Mannheim-Ludwigshafen, Oberkirch, Stuttgart, Nürnberg kaj Würzburg.

Pri la prelego kaj kunveno en Hamburg Hans Breitenbach, Berlin, raportis en "Berlina Informilo". Ĉi-sekve ni publikigas tiun raporton:

### Varsoviano en Hamburgo

Jam antaŭ kelka tempo, Germana Esperanto-Asocio decidis fari kampanjon kun la celo, doni impulsojn al la loka Movado, impulsojn en formo de iom eksterrutinaj okazaĵoj. Certe, tia eksterrutinaĵo estas rondvojaĝo de Jerzy Grum, redaktoro de Pola Radio, Varsovio, tra deko da okcidentgermanaj urboj. La rondvojaĝo komenciĝis en Hamburgo kiel la unua etapo. Ĵaŭdon, la 21-an de oktobro, s-ano Jerzy Grum faris kulturpolitikan paroladon, kies ĉefa temo tamen estis la Esperanto-agado de Pola Radio.

Ĉar laŭ decido de la plimulto de nia estraro Berlino ne apartenas al la stacioj de tiu rondvojaĝo, mi por mi mem decidis uzi tri feriotagojn kaj veturi Hamburgon por persone travivi tiun eventon tiel bonintence aŭspiciitan de Germana Esperanto-Asocio, kaj kvankam ne estis Pentekosto, mi povas diri ke mi ne pentas la koston. Tamen, mi estis la sola ne-hamburgano.

La hamburgaj esperantistoj ĵus ekprenis la riskon, l u i klubejon. La ĉiumonatan lupagon de tricent markoj plus hejtado k.c. ili esperas kunigi per ekstraj kontribuaĵoj de la membroj ĉiusemajne frekventantaj la ejon. Kuraĝaj homoj, tiuj hamburganoj, ĉu ne? Sed la kuraĝo certasence estas pravigata de la nombro de partoprenantoj en la klubvesperoj, kiu laŭ niaj mezuroj estus fabela.

La parolado mem kaj la demandado kaj diskutado estis interesaj. Krome s-ano Grum kunportis magnetofonan registraĵon de radiodrameto duonhoron longa. Ĉiujn ĉi okazaĵojn mi povus prezenti sonbende al interesiĝantoj.

Laŭprograma kunveno de BELO

Nürnberg (pp) - Laŭprograme disvolviĝis la kunveno de la Bavara Esperanto-Ligo en Nürnberg, la 30-an kaj 31-an de oktobro, en kiu partoprenis entute ĉ. 40 personoj. La laborkunsido traktis organizajn problemojn kaj konfirmis la decidojn de Augsburg. Vespere okazis interesa demandoludo pri la historio de Esperanto, kiu certe kontribuis al la plivastigo de la scio pri tiu temo. Dimanĉe matene Gerald Tucker, fakestro pri lingvaj ekzamenoj en Germana Esperanto-Instituto, prezentis la metodikon de provlecionoj taŭgaj por ekspozicioj ktp. laŭ la spertoj de la Germana Esperanto-Ekspozicio en Augsburg. Ankaŭ tiu aranĝo, en formo de seminario, estis por multaj instrua kaj instiga. Gerald Tucker intencas ankaŭ estonte aranĝi tiajn seminariojn, la venontan pri kursgvidado. Jam nun povas sin anonci interesuloj ĉe Gerald Tucker, Trettachstr. 34, 8900 Augsburg.

Pri la kunveno raportis gazetaro kaj Bavara Radio.

Karnavala Renkontiĝo en Hungario

Györ (pp) - La 12-an kaj 13-an de februaro 1977 okazos en la urbo Györ, Hungario, la 11-a Karnavala Esperanto-Renkontiĝo kun Balo. Aliĝlimdato: la 15-a de januaro 1977. Pli detalajn informojn oni bonvolu peti de: Teritoria Komitato de HEA, Pf. 228, H-9002 Györ, Hunagario.

Laborkonferenco en Leipzig

Leipzig (pp) - La 6-an kaj 7-an de novembro 1976 okazos en Leipzig la Centra (Balota) Konferenco de la esperantistoj organizitaj en Kulturligo de GDR. En tiu konferenco prelegos ankaŭ Jerzy Grum, Varsovio, pri la laboro de Esperanto-Redakcio de Pola Radio.

Esperanto en Radio

Vatikano post-tagmeze en Esperanto

Sekve de la relative multaj petoj, kium atingis la Vatikanan Radion, preskaŭ certe ĉi tiu stacio plilongigos la Esperanto-anguletojn kaj lokigos ilin en pli taŭga horo. Laŭ nuntempaj intertraktadoj, ŝajnas, ke oni povos aŭdi Esperantlingvan programeton ĉiun sabaton de la 18,45 ĝis 19-a horo, kun informa karaktero pri aktualaj temoj. Probable, la nova programo komenciĝos je Kristnasko.

Intertempe, oni ne ĉesu skribi al la Vatikana Radio, petante, ke oni elsendu pli longe, en pli taŭga horo kaj kun pli ampleksa enhavo ol nun; tiamaniere oni subtenos la agadon de la esperantistoj, kiuj en Romo mem klopodas konvinki la estraron de Vatikana Radio pri la menciitaj ŝanĝoj. (Laŭ Radio Roma).

Varsovio: Ekde la 8-a de novembro validas la nova kadra programo de Radio Varsovio por la periodo novembro 1976 ĝis majo 1977. Grava estas la aldona ondolongo 25 metroj en la posttagmeza programo (16,30 horo). Tiu ondolongo ebligas pli bonan aŭdeblecon. La aliaj ondolongoj restas senŝanĝaj. Petu la programfolion kun detalaj informoj pri enhavo de la elsendoj, ondolongoj kaj horoj de Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O.Box 46, PL-00-950 Warszawa 1, Pollando.- Ĝis fino de oktobro la Esperanto-Redakcio ricevis 4 879 korespondaĵojn dum 1976-a jaro. En la pasinta jaro envenis iomete pli ol 5000 korespondaĵoj. Kontribuu skribante poŝtkarton aŭ leteron, por ke en 1976 estu nova koresponda rekordo.

Vieno. La lastsemajna komentario de d-ro Alfred Macher temis pri la nacia festotago de Aŭstrio kaj problemoj ligitaj al la neŭtraleco de tiu ŝtato. Pri "Lerneja informvespero pri Esperanto" parolis d-ro Karl Beckmann.

## Homoj kaj Nomoj
### kun kaj sen Renomoj

Kardinalo Giacomo Lercaro, Bolonjo, mortis la 18-an de oktobro 1976 en la aĝo de 85 jaroj. La nomo de la kardinalo, siatempe unu el la plej elstaraj personoj en la katolika Eklezio, estas kar-memora inter la esperantistoj, ĉar li plurfoje montris varman simpation al la idealoj de la Esperanto-movado.

Friedrich Bierhoff, Döttingen, Svislando, festis antaŭ kelka tempo la 90-an datrevenon de sia naskiĝo. Malgraŭ sia aĝo samideano Bierhoff, de jaroj leganto de Pilo-Press, regule partoprenas ankoraŭ Esperanto-aranĝojn, aŭskultas Esperanto-elsendojn kaj varbas por Esperanto.

Andrzej Grzebowski, Bydgoszcz, Pollando, fariĝis nova prezidanto de Pola Esperanto-Asocio. Li sekvas en tiu ofico St. Swistak, kiu ne plu kandidatis. Unu el la du vicprezidantoj fariĝis Andrzej Pettyn, la konata redaktoro de Pola Radio.

Bertil Englund, sveda esperantisto kaj muzikisto, nun ludas en orkestro de Hof, urbo en norda Bavario. Lia adreso estas: Bertil Englund, Plauener Str. 6, D-8670 Hof.

Prof. D-ro Ilmar Tammelo, Universitato de Salzburg, baldaŭ mem esperantigos sian libron "Philosophie des Überlebens" (Filozofio de la postvivo).

Grigorij Gercikov, Talgar, Sovetunio, gvidas nun Esperantokurson en la ŝtata konservatorio en Alma Ata, la ĉefurbo de Kazaĥa Respubliko. Salutkartoj el la tuta mondo helpus al naskiĝo de nova Esperantoklubo. Adreso: Konservatoria KID, Esperantokurso, Pr. Kommunistiĉesky 90, SU-480091 Alma Ata.

Laŭ informo de Adolf Schärger, Kehl, la novfondita Esperantogrupo Kehl nun havas 8 membrojn kaj 14 interesulojn. La grupo eldonas informilon.

Fritz Karov, Köln, aktivulo en la blindula Esperanto-movado, parolos pri "Louis Braille kaj Zamenhof rilate al la blinduloj" dum la Zamenhof-festo en Hamburgo, la 11-an de decembro.

********************

## Korekto

Laŭ peto de Loka Kongresa Komitato de la 47-a Itala Kongreso de Esperanto ni publikigas rilate al nia raporto pri tiu kongreso (Pilo-Press n-ro 39/76, p. 1 + 2) jenan korektan informon:

"Dum la ceremonio de la malkovro de la busto de d-ro L.L. Zamenhof en la pitoreska, historia Kastelo Malaspina parolis kaj ĉeestis je nomo de la Itala Registaro Edoardo Speranza, sottosegretario di Stato al Ministero di Grazia e Giustizia. Tute do ne temis pri la ministerio de Agrikulturo."

## Esperantistoj skios en Adelboden

La Chaux-de-Fonds (pp) - Por la 20-a fojo disvolviĝos ĉi-vintre la nun tradicia esperantista skiferio en Adelboden, skiparadizo en la svisa alparo, de la 25-a de decembro ĝis la 5-a de januaro 1977. Ĝi grupiĝos maksimume 25 sportemulojn, kiuj helpas al la dommastrumado, tranoktas en dormejoj kaj vivas en mezkomforta ĉaledo. Partprenprezo: 250 svisaj frankoj por gelernantoj, studentoj, metilernantoj; 300 sv. fr. por aliaj partoprenantoj. La prezo inkludas la loĝadon, manĝojn, trinkaĵojn, ski-instruadon, veturojn dum 4 komunaj ekskursoj. Interesatoj petu detalan informon de Kultura Centro Esperantista, poŝtfako 621, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

# Konkurso de Pola Radio

10-tagaj ekskursoj tra Pollando

Valoraj objektaj premioj

estas akireblaj de niaj aŭskultantoj kaj legantoj, kiuj donos respondojn al jenaj demandoj:

1) Kiujn polajn artiklojn oni povas aĉeti en via lando kaj kiel vi pritaksas ilin? Kiuj polaj artikloj (produktoj) ĝuus tie sukceson?

2) Kiel vi vidas la perspektivojn de la plua evoluo de la kunlaboro de via lando kun Pollando? Kio, laŭ via opinio, influis aŭ povus kontribui al plivastiĝo de tiu ĉi kunlaboro?

3) Kiel vi pritaksas la servan agadon de polaj transportaj entreprenoj ( Polaj Aer-Linioj "LOT", Polaj Oceanaj Linioj, Internacia Aŭtomobila Transportado "PEKAES", Polaj Ŝtataj Fervojoj) kaj de la Turisma Oficejo "Orbis"?

Respondo jam al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La leterojn ni petas sendi laŭ la adreso:

Pola Radio, Esperanto-Redakcio, PL-00-950 Warszawa 1, Poŝtkesto 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo: "Konkurso", ĝis la 31-a de decembro en la 1976- jaro (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultojn ni anoncos en la disaŭdigoj de la Pola Radio por Eksterlando la 31-an de januaro en la 1977-a jaro kaj en la marta numero de la monatrevuo "Polska" (Pollando).

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la organizantoj de la konkurso.

Ni deziras bonŝancon en la lotumado de la premioj.

Partoprenu la konkurson mem kaj partoprenigu aliajn!

Polskie Radio Warszawa

Pola Radio disaŭdigas trifoje ĉiutage en Esperanto:

| | | |
|---|---|---|
| 6,oo horo | ondolongoj: | 41 m, 49, 75 m, 200 m |
| 16,30 horo | ondolongoj: | 25 m, 31 m, 41 m |
| 22,30 horo | ondolongoj: | 41 m, 49 m, 75 m, 200 m |